
# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k66.htm




Nro 66a Aprilo/junio 2005

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

**ISSN 1697-6460**

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***nova konto*** *nº* ***2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: La Papo, kiu entombigis Sovetunion, jam mortis.

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Miguel Gutiérrez Adúriz,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***Juna Penso***, de Vinko Markov,
11 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
12 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
13 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



# Enhavo

Redaktore: Papo mortis ........ 3
Informoj de la prezidanto ........ 4
Letero al prezidanto ........ 4
Pripenso pri Usono ........ 5
Migrado kaj kunagado ........ 7
Centraj paĝoj: pasinto kaj estonto ........ 12
La 13-a Internacia Esperanto Semajno de KulturoKaj Turismo .... 17
La 14-an de aprilo ........ 18
Post Referendumo ........ 21

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Redaktore

## Papo mortis

La 2-an de aprilo mortis Johano Paŭlo 2-a, la *Granda* Papo, laŭ kelkaj eĉ pli granda ol Leono *la Granda*, inventinto de kalendaro nuna. Kelkajn semajnojn poste, oni elektis novan Papon, kiu verŝajne sekvos la taskon de la antaŭa, kies sekretario li estis dum multe da jaroj. Ŝajnas ŝerco, ke antaŭ ok jaroj Kardinalo Ratzinger deziris emeritiĝi, sed tiama papo Johano Paŭlo 2-a ne permesis tion, ĉar li ne povis anstataŭi lin.



Ĉe nia etoso laborisma kaj esperantista, mi legis multe da reagoj, sed certe neniu favora al forpasinta aŭ al venanta papoj. Tion mi ne kontraŭas, sed certe mi dezirus, ke estus iom pli da objektiveco je la momento kritiki la farojn, aŭ misfarojn, de Karol Wotila aŭ Kardinalo Ratzinger. Mi vidas, tamen, iom da poezia beleco je tio, ke post pola papo venu germana. La komenco de la lasta mondomilito estis invado de pola lando fare de germanoj..., ĉu ni estas nun je la komenco de nova etapo en historio de homaro, same kiel tiam?

Ĉiel ajn, oni ne povas diri, ke la mortinta papo estis sengrava, aŭ ke eĉ ni ateistoj povas resti neatentaj al lia personeco kaj atingoj. Lia sociala sinteno, ekzemple, multe gravis. Oni konsideris lin konservativa rilate al aferoj reproduktivaj kaj seksaj, kaj pri la rolo de virinoj en la Eklezio. Liaj verkoj pri homseksumo, nomitaj *Teologio de la korpo*, estas longa meditado pri la naturo de vireco kaj ineco kaj ties implikoj rilate al amo kaj seksumado. Tiuj lernigoj reprezentas plensignifan disvolvon de katolika instruado pri sekseco, kiu originas je la verko de Reĝo Salomono, ***Kanto de kantoj***, kaj de la eklezia instruado pri sakramentoj. Pri aborto, li diris, ke «*ankoraŭ estas laŭleĝa ekstermado de homaj estaĵoj, kiuj jam estis kreitaj, sed ne ankoraŭ naskitaj. Kaj tiun ekstermadon faras nenio malpli ol demokratie elektitaj parlamentoj kie oni kutime pledas por civila progreso de socio kaj homaro*».

Pri la *Teologio de Libereco* li estis tre kritika, ĉar ĝi emfazas politikan liberigon koste al libereco spirita. Per sia verko ***Evangelio de Vivo*** (*Evangelium Vitae*) li asertis, ke la Katolika Eklezio pritaksas alte homan vivon kaj sekve ĝi kondamnas aborton, eŭtanazion kaj ĉiun formon de mortopuno, kiuj konsistas ili ĉiuj parto da *kulturo de morto*, kiu estas eniginta en modernan mondon. Liaj ideoj pri mortopuno, pardono de monda ŝuldo kaj malriĉeco estas rigardataj kiel politike avantgardaj, pruvante tiel, ke *avantgarda* kaj *konservativa* estas etikedoj politikaj, kiujn ne plu oni povas alĝustigi al religiaj gvidantoj. Li estis klare kontraŭ la Milito de Irako, kaj sia Ministro pri Paco, Pia Kardinalo Lagi, esprimis al Prezidento Georgo Buŝ la oponon al tiu milito. Ankaŭ li malsukcesis realigi, ke konstituigante la Eŭropan Ĉarton, oni agnoskis la historian Heredon Kristanan de Eŭropo. En la verko ***Memoro kaj idento***, Johano Paŭlo 2-a priskribis *geedzecon* samsekseman kiel *premon* de Parlamento Eŭropa, dirante li, ke *estas legitime kaj bezone diri al si mem, ĉu tio ne estas parto de nova ideologio de malbono, eble pli insida kaj kaŝita, kiu ĵetas homajn rajtojn kontraŭ familio kaj kontraŭ homo mem*. La papo malpermesis, ke ekleziaj funkciuloj havu la eblecon ŝanĝi registrojn tiel ke la sekso de transseksuloj adaptiĝu al seksoŝanĝo, taksante tiujn aferojn kiel *mensajn patologiojn*.

Se laboristo estas tiu, kiu laboras por gajni sian vivon, estas dece, ke ni dediĉu kelkajn vortojn al pasinta papo, ĉar li multe verkis, vojaĝis kaj laboris pro ideologio sia, eĉ se ĝi fremdas al tiuj, de aliaj homoj, kiujn mi ankaŭ respektas.

Estas vere, ke laste okazis kelkaj eventoj rilate al nia asocio kaj najbaraj, sed mi opinias, ke oni povas neglekti ilin almenaŭ ĝis la venonta numero, kaj eble ni forgesos ilin tiam. Oni ne gravigu sengravaĵojn, kaj la aferoj mortos per ili mem.

La lastan 14-an de aprilo datrevenis la eko de la lasta hispana respubliko, *La Respubliko* laŭ kelkaj, kiuj atencas grave al historio kaj al homa deco. Al tiuj kaj al maltiuj, mi referencas al paĝo 18-a, kie mi klarigas tiun punkton iomete pli longe.

# Informoj de la prezidanto

Kara legantoj! Kvankam aperas en tiu ĉi numero de ***Kajeroj el la Sudo*** artikoloj pri la Papo, pro manko da spaco ne aperas kritikaj artikoloj pri li kaj lia regado: en la venonta numero aperos tiaj artikoloj.



Ni volas malfermi la revuo al sociaj temoj kaj en tiu ĉi momento ni laboras en artikoloj pri la infana prostituado, kiu okazas en Tailando kaj aliaj aziaj landoj.

La ***Gazetoteko Lanti*** pliboniĝas, ĉar nekonata samideano lasis nin ekzemplerojn de ***Popola Fronto***, kiuj SATanoj, HALE-anoj kaj ĉiuj ajn aliaj povas legi..., senpage! Vere tio kostas mono, sed HALE pagas dume kiam ni povos.

Plaĉus al ni, ke en interreto vi povas legi artikolojn kiu estis skribita dum la Hispana intercivitana milito, tiujn, kiujn oni trovas je ***Popola Fronto,*** kaj ke vi povas senti la aeron de la malvenko kaj la aero de la iluzio por la estonteco.

En la *landoj de la ideoj* ni trovas la verkon de Kaplan, usona ĵurnalisto, kiu verkis ***Vojaĝo a la estonteco de la Imperio***.

Ekde nia liberpenso, HALE zorgigas nin pri la estonteco de Usono kaj la kapitalismo: la demando estas **Ĉu en la estonteco ni loĝos en getoj?** La libro diras nin ke en Usono la usonanoj loĝas en apartaj kvartaloj.

En tiu ĉi momento mi ricevas ***Sennaciulo***n. Mi legas kaj aperas artikolo de SATeH, kiu havas multajn malprecizigojn, kiuj igos min unue verki artikolon pri tiuj eraroj, kaj poste mi sendos ĝin al la redaktoro de ***Sennaciulo*** por ke li publikigu ĝin kiel rajto de repliko; kaj se ***Sennaciulo*** ne aperigos mian laŭleĝan replikon, ĝi estos publigata en ***Kajeroj el la Sudo***.

*Juan Antonio Cabezos Martínez*
*Prezidanto de Hale*

# Letero al Prezidanto

Sr-o Juan Antonio Cabezos Martínez:

Mi estis edzino de José Do Nascimento Marqués. Mi bezonas esprimi dankemon al tiuj, kiuj sendis al miaj manoj la numeron 64-an de ***Kajeroj el la Sudo***, kie aperas publikigite la notoj, kiujn Jozefo verkis pri la vaska popolo kaj ties omaĝo. Pri tio jam parolis al mi S-ro Lunazzi.

Antaŭ dek tagoj mi ricevis la magazinon, kaj tio igis min plori multe, sed pro ĝojo. Per vi, per tiu maniero, Jozefo estis agnoskita en la mondo esperantista, kaj mi devas diri al ĉiuj, ke li estis vera pasiulo pri tiu lingvo.

Esperanto akompanis lin dum siaj lastaj tagoj. La tagon antaŭ li mortis, en hospitalo, li diris al mi, ke li bezonas reveni en nian hejmon, por daŭrigi noton, kiun li ankoraŭ ne povis fini.

Mi senfine dankas tion, ke vi alproksimiĝis al mi per tiu maniero, per tiu bela memoraĵo, kiu kuŝas nun kaj por ĉiam en lia noktotablo.

Korinkline,

*Carmen Lima*

Lando de ideoj

# Pripenso pri Usono

Robert Kaplan verkis ***Vojaĝo al la Estonteco de la Imperio***. Li defendas, ke Usono fiaskas. Li argumentas jene:

1 Ke la blankuloj loĝas en apartaj ejoj kaj forlasas la urbojn ĉar al ili ne interesas la politiko de la urboj.

2 Ke aperas internaj entreprenistoj, kaj tio igas ŝanĝon en Usono.

3 Ke aperas la ŝtaturboj kaj la centra registaro perdas povon.

Se Robert Kaplan, krom esti ĵurnalisto, estus estinta historiisto pri la Mondo Klasika, li disponus de argumentoj eltiritaj de la Malalta Romiana Imperio, por konvinki nin pri la simileco inter la forkuro de la blankuloj for de siaj urboj, kaj la forlaso de la urboj flanke de la patricioj romiaj al la vilaoj, kiujn ili havis en la kamparo.


Romia patriciino

La blankuloj elmigras al la urbanizaĵoj ĉirkaŭantaj la urbojn, dum la romia patriciaro elmigris al la vilaoj, kiujn ili havis en la kamparo.

La blankuloj eskapas el la urboj ĉar ili tie devas pagi impostojn por ricevi servojn kaj tiuj ĉi ne sufiĉe kompensas la penon krom suferi altajn krimindicojn.

La patricioj forlasis la urbojn por ne pagi la impostojn, kiuj subtenis la legiojn romianajn.

Se la proceso estus ĝeneraliginta, tio ĉi estas iomgrade priokupinda, sed Kaplan esence diras, ke la forlaso aperas kiam la blankuloj kunvivas kun aliaj rasoj kaj kulturoj, tio estas: la nigruloj kaj la hispanidoj. Laŭ Kaplan, kiam la nigruloj kaj la hispanidoj plinombriĝas, samtempe plinombriĝas la deliktoj kaj la blankuloj iras blendi sin en urbanizaĵojn. Tamen, mi ne kredas, ke la forlaso de la urboj, flanke de la blankuloj, estas simptomo de la dekadenco de Usono.

Samtempe de tioma riĉecoprodukto eksportata tutmonde, okazas disgetiĝo de la socio, tio estas, ke ekzistas kvartaloj or nigruloj, por hispanidoj, por azianoj, kvartaloj por blankuloj...

La sociajn diferencojn faras la mono (hispanidoj kun mallaltaj salajroj, nigruloj supervivante per monhelpoj); la kulturo (hispana kulturo antaŭ la blanka kaj anglosaksona); la raso (azianoj unuflanke hispanidoj, nigruloj kaj blankuloj aliflanke).

Kiam socio estas malriĉa,la klasaj diferencoj estas mildigitaj, sed en la riĉaj socioj ili estas pli evidentaj, tiel la blankuloj

havas pli bonajn lernejojn, pli bonajn profesiajn kvalifikojn kaj pli bonajn salajrojn.

La disgetiĝa proceso de la socio ne signifas, ke Usono fiaskas, sed ke la konkurencoj socia kaj kultura konsistigas la bazon de Usono.

Ni riguardu la kazon de Mursjo. Mursjo estas aŭtonoma komunumo kun pli ol 1.5 milionoj da loĝantoj, riĉaĵo averaĝe bone distribuita, kun preskaŭ plena dungiĝo kaj situanta en tiu riĉa parto de Hispanio nomata *Mediteranea Arko*. Iom post iom getiĝas la kvartalo Sankta Andreo (San Andrés), kie estas multenombraj enmigrintoj kaj jam estas kromnomata *Tria Mondo*; ties ĉi mezaj klasoj eskapis norden de la ĉefurbo Murcia; ĉu al novaj kvartaloj kiel La Flota aŭ Juan Carlos I, ĉu al ĵuskonstruitaj urbanizaĵoj kiel Altorreal.



Paralele al la disgetiĝo estas la fenomeno *la golfludaj kampoj*. Ni rimarku la golfkampon de Torre Pacheco, negocata kaj kuraĝigata de la entrepreno Polaris World:

~La plejmulto el la domoj de la golfkampo estas aĉetitaj de angloj.

~La kampo kalkulas kun hotelo, supermerkato, hospitalo kaj ... eĉ kun privata sekureca korpo!

Tio estas, ene de la golfkampo angla bienhavanto povas vivi tutan jaron sen diri eĉ unu vorton en la hispana lingvo. Jen ekzemplo de getiĝo. Ĉu tio signifas, ke Hispanio estas en dekadenco? Ne, ĝi nur signifas, ke la riĉeco distribuis la loĝantojn.

La argumenton de la ekapero de internaciaj entreprenistoj mi lasas por alia kompleta artikolo.

Rilate la trian argumenton de la apero de ŝtaturboj, Kaplan esprimis, ke la ekzisto de ŝtaturboj malgrandigas la povon centran de Vaŝingtono. Tamen, la Historio ne kutimas iri tiudirekten, sed male, al la pluekzisto de la centraj povoj. Kvankam novaj ŝtaturboj (kiuj en Hispanio estas la metropolaj zonoj) atingas pliajn direktopovon kaj impostkapablon, tio ne signifas, ke la centra povo malaperas; simple, ĉar la konfliktoj inter ŝtaturboj necesigas la ekziston de forta, centra povo, kiu rolos kiel arbitristo, kaj tiu centra povo estos forta se ĝi estos apogata de armeo nacia, ne se ĉiu ŝtaturbo havas sian propran armeon.

Nu, ni ekvidu la kazon de Eŭropo. En Eŭropo ni havas sendependajn ŝtatojn kun grandaj historioj tiaj, kiaj la franca, la angla aŭ la hispana. Ĉiu ŝtato estas rezignante pri parto el sia suvereneco favore al la povo de Bruselo, kiu *estas la arbitristo kaj eĉ montras la politikojn realigendaj de la ŝtatoj*.

Estas certe, ke Eŭropo ne havas tutnacian armeon, ĝi eĉ ne havas tutnacian policon, malsame de FBI en Usono, sed kiam la estraro de Bruselo havos siajn armeon kaj policon, ĉu oni povos diri, ke Eŭropo estas en dekadenco? La respondo estas *ne*.

**Johano Antono Cabezos**

# Migradoj kaj kunagado



## *Enkonduko.*

La senĉesa alvenado de enmigrintoj, plejofte eksterleĝe, surprizis la sinsekvajn hispanajn estrarojn kontraŭpaŝe, same kiel al la asocio.

Tial nepris amendi ree la tiel nomatan Leĝon pri Eksterlandaneco kaj malfermi oftaj kampanajoj por amasaj laŭleĝigoj de FAEoj (fremduloj alvenintaj eksterleĝe). Sed estas ĉiufoje poi evidenta, ke la hisapna ekonomia kreskado bezonas laboristojn por pluraj sektoroj: konstruindustrio,hortokulturo, stratpurigado, hejmservado, restaŭrado, ktp. Post 10 jaroj –se daŭrigus la migradalfluo—po tri el ĉiu deko de loĝantoj de Hispanio estus afrikidoj; latinamerikidoj aŭ orienteŭropidoj. En kelkaj kazoj la enmigrintoj estas savante kelkajn municipojn duonsenloĝitaj de la landinterno, kontraŭ sia estingiĝo. Pro, la alta naskocifero de plimulto el la familioj de enmigrintoj jam komencis renversigi la loĝantoperdadonde Hispanio –la plej kontraŭnaskisma lando el Eŭropo—. Tio ĉi, samtempe, replenigis per infanoj kelkajn lernejojn kaj savis la Socian Publikan Asekursistemon de proksima bankroto kaŭze de troa pliigo de la emeritaj pensioj dum ege malkreskis la kotizoj de la laboristaro aktiva.

Plimulto el la enmigrintoj havas malaltajn klerecnivelojn, tamen, ankaŭ estas tiu, kiuj posedante universitatajn atestilojn devas fari hardajn kaj senkvalifikajn taskojn. Ambaŭ klasoj ne komkurenas kun la hispanaj laboristoj, ĉar ili havas la postenojn rifuzitajn de tiuj ĉi.

La amaseco kaj senĉeseco de la enmigraj fluoj estas kreante en kelkoj la senton esti invadataj kaj jam estigis la potencigon de naziaj grupoj —ankoraŭ tre minoritataj, sed pli kaj pli aktivaj—.

## *Speciala kazo.-*

Enmigrintoj el la Eŭropa Unuiĝo.- Pliofte temas pri geedzaj paroj, sen gefiloj je siaj kostoj kaj posedantoj proprajn domojn en nia lando. Ili apartenas al sociaj tavoloj altaŭ mezklasoj kaj loĝas ĉe marbordaj municipoj. Ili loĝas en Hispanio konstante aŭ duonkonstante kaj alvenis serĉe de milda kaj sunplena klimato, krome de ampleksaj kulturoferto kaj libertempaj eventoj.

Grandparte ili estas emerituloj, kiuj pro nerego de la hispana nur interrilatas kun gentoj el siaj sama lando kaj lingvoj. Ili ankaŭ kutime rifuzas registri sin je la censoj de enloĝantoj de siaj rezidencaj municipoj ĉar:

1e.- Neniu normo devigas ilin fari ĝin.
2e.- Tiel ili evitas pagi kelkajn municipajn taksojn.

3e.- Ili opinias sin nek enmigrintoj nek eksterlandanoj, sed eŭropaj civitanoj, kaj ili neniam perdas siajn ligojn kun siaj devenejoj.

Ne registriĝinte, ili provokas malhelpojn de planado kaj provizado al la servoj municipaj. Por eviti tion, kelkaj urbestraroj ofertas eksterordinarajn pagojn da 180 eŭroj, okaze de la somersezono kaj de Kristnasko al ĉiuj emerituloj encensiĝintaj en siaj municipoj, krom garantii al ili la senpagan uzadon de la publikaj aŭtobusoj.

Tia ĉi enmigrado estigas ankaŭ pozitivajn efikojn: injekton de katpitaloj en la lokajn ekonomiojn; pliigon de la konzumo; pliigon de la nerekta dungigo ĉefe en la konstru-industrio; pliigon de la kolekto de impostoj sur nemoveblaĵoj; plivigligon de domomartekoj kaj kuraĝigo de la libertempaj okupoj.

Ties ĉeesto ankaŭ estigis multiĝon de la privataj klinikoj kiel komplementon de la lokaj sanservoj –pli limigitaj ol tiuj de siaj devenlandoj—.

La negativo de tiu ĉi enmigra fenomeno estas ke, pro ties granda maljuneco, ĉi enmigrintoj bezonas pli kaj pli da sanservoj kaj infrastrukturoj, kaj tio povas malekvilibrigi la municipajn buĝetojn. Tion ĉi pligravigas ties rifuzemo registri sin, ĉar kaj la tutlandan distribuadon de rimedoj kaj tiun de la infrestruikturoj oni faras surbaze de la nombro de registritaj loĝantoj, ne kalkulante kun la necesoj de la ceteraj.

***Konstanta holokaŭsto antaŭ niaj marbordoj.-***

La maroj apud la Ĝibraltara Markolo kaj ĉirkaŭ la Kanariaj Insuloj konsistigas ĉiujare la amastombejojn de la mizeruloj, kiuj vojaĝinte de siaj devenaj landoj riskas transiri la marojn ekde Saharo ĝis la Kanariaj Insuloj kaj ekde Maroko ĝis la marbordoj de Andaluzio. **Avaraj mafiuloj portas ilin per siaj motorboatoj nestabilaj** kaj plenplenaj de okupantoj, tra danĝeraj kaj malvarmaj akvoj konstante sub la minaco de alfundiroj. Kelkaj estas barataj de la marokaj marbordaj gardoŝipoj, aliaj de la patrolŝipoj de la Hispana Civila Gvardio; sed kelkaj sukcesas atingi Hispanion kaj postvivi en domaĝaj kondiĉoj. **Multoj dronas –proksimume 1 000 kadavroj po ĉiu jaro**, laŭ la raporto de ATIME (mallongigo hispana de Asocio de Enmigrintaj Marokaj Laboristoj en Hispanio) estas trovataj ĉu sur la marokaj marbordoj, ĉu sur la hispanaj—. Tiuj, kiuj sukcesas eviti la kontrolojn kaj la alfundirojn estas akceptataj ĉu de aliaj enmigrintoj kiuj ilin


Kial veni en senkompatan Eŭropon?

atendas en nia lando, ĉu de neregistaraj organizaĵoj kiel Ruĝa Kruco aŭ Cáritas España (katolika hispana organizaĵo bonfara). Kvantego de enmigrintoj finas siajn vojaĝojn en centroj de internigo por eksterleĝaj enmigrintoj –kie ili devos atendi la verdiktojn de siaj forpeloj de Hispanio, tamen, sufiĉe granda nombro el ili; ne portante dokumentaron, aŭ pro neekzisto de traktatoj de repatriigo kun ties devenaj landoj; ne povas esti forpelataj fakte, kaj daŭre restas en la centroj ĝis momento kiam, **post decido de la loka guberniestro, ili estas metataj en aviadilojn kaj fluge kondukataj al pluraj hispanaj urboj—en kes ĝardenoj aŭ stratoj—ili estas; kvazaŭ plagitoj; forlasataj je sia sorto.**



Dum la somera sezono estas ofte ke dum grupoj de sunumantoj ripozas en iu plaĝo de Andaluzio, subite aperas motorboatoj sur la horizonto kaj nelonge poste elboatiĝas kaose amaso de elmigrintoj lacigitaj, timigitaj kaj frostotremantaj –tiaj ĉi bildoj okazas antaŭ la indiferenteco de kelkaj ĉeestantoj, la scivolemo de aliaj, kaj la klopodoj helpi la alvenintoj flanke de la ceteraj—.

Malgraŭ la sinsekvo de estraroj en Hispanio, kiuj iom post iom plistriktigis la marajn kontrolojn, **la aŭtoritatoj de EU opinias, ke Hispanio estas tro cedema pri la migrofluoj**. Ĉu ili kredas, ke la sola solvo kontraŭ la eksterleĝa enmigrado konsistas el estingo polica de ili? Ĉu tio eblas sen antaŭa nuligo de ties sprono, kiu estas la ekstrema mizero? **Kia paradokso, ke dum la aŭtoritatoj de EU emfaze defendas la liberajn cirkuladojn de mono kaj varoj, ili samtempe baras tiun de homoj!** Tio ĉi montras ksenofobion kaj malsolidarecon.

## *Migradoj ekde paciga vidpunkto.-*

Por efike kaj hominde ektrakti la temaron de la migradoj, nepras, unue, **garantii la loĝantojn el ĉiuj landoj ties eblecon satigi siajn necesojn** de liberesprimo, delokiĝo, nutrado, saneco, laboro, loĝado, kleriĝado, kaj tiel plu, sen kiuj multoj sentas la sintrudon elmigri. Aliflanke, dum persistas la menciitaj senhavoj en kelkaj landoj, devos esti rispektata la rajton elmigri de ties loĝantoj. Neniu restu indiferenta antaŭ la kondiĉoj senhomaj, kiujn travivas kompletaj vicoj de enmigrintoj! Ili estas infanoj, junuloj, plenkreskuloj, maljunuloj, eĉ gravedulinoj kun vizaĝoj tristaj, kaj ekstreme minciĝintaj. Ĉe la centroj de internigo oni donas al ili la minimumon necesan por postvivi (sekajn vestaĵojn, manĝaĵojn, kaj iomete da mono). Kiu travivas tiom akrajn spertojn bezonas diligentajn kaj konkretajn helpojn.

**Se oni kuraĝigas la laŭgradan integriĝon de la enmigrintoj kun respekto al ties**

**kulturaj identecoj familiarigante ilin al la kulturaj kunhavaĵoj kaj leĝaroj de la gentoj de la akceptolandoj, estos malpli da risko de stariĝo de getoj izolitaj kaj malamikaj de la ŝtata kunteksto,** kiuj treeble poste strebus al iompostioma konkero de la landoj de ties akcepto. Se tio ĉi okazus, ĝi pravigus al tiuj homoj, kiuj timas invadon de eksterlandanoj. Kiam la malsamaĵoj estas laŭgrade integrigataj ŝprucas kunvivadoj multetna kaj multreligia kie oni remalkovras komunajn valorojn kapablaj unuigi. Tiel la migro-fenomeno alproksimigus la pacan revon de la homaro.

**Ne eblas ekfari politikan integrigon sen antaŭa agnosko de la rajto elmigri**. La migrofenomeno enhavas la laboristaron de preter la landlimoj, la laboristojn altrangajn de la multinaciaj entreprenoj, la delokigitojn pro la militoj kaj la fizikan reunuigon de la enmigrintoj kun siaj familianoj, kiuj restas en la devenlokoj. La migradoj ne trafas ekskluzive minoritatojn kaj senesperulojn.

### *Enmigrintoj kaj laborpostenoj.-*

Oni ofte aŭskultas la kliŝon jenan: 'La enmigrintoj deprenas laborpostenojn al la hispanoj. La hispanojn unue'; prezentata de ĉiaj personoj –fortune ankoraŭ minoritataj, en lando kiu estis antaŭ kelkdejo da jaroj lando de elmigrado—kio estas la senkulpilo por kelkaj politikistoj ekstremdekstraj por defendi siajn ksenofobiajn projektojn; same kiel taŭgas al la naziaj bandoj de kaprazitoj por fizike ataki sen sentoj de kulpo al la enmigrintoj, kiujn ili trovas je sia vojo. **Ligi la nombron de sendungitoj kun la nombrokresko de enmigrintoj ne havas fundamenton**, ĉar estas disdonataj ĉiujare 30-foje malpli da laborpermesoj ol la nombro de sendungitoj; male estas fundamentite konjekti, ke sen la alporto de la enmigrintoj al la vigligo de kelkaj ekonomiaj branĉoj en depresio (agrokulturo, tekstilindustrio, kaj tiel plu) povus esti eĉ pli da sendungitoj. **La alveno de enmigrintoj laboristaj ne kaŭzas plian mizeron, sed plian ekonomian kreskon**. Ni akceptu la rajton elmigri agnoskita en la Ĉarto de Homaj Rajtoj, kaj akceptu ke estus trouze rezervi nian landon por ekskluziva uzo de la nacianoj, aŭ postuli ke la enmigrintoj senkritike asimilu niajn kutimojn, ŝtatlingvojn kaj vivmanierojn kun forgeso de ilies.

Oni forigu de niaj instruejoj, de niaj interparolejoj kaj centroj de libertemaj aktivaĵoj la antaŭjuĝojn kaj stereotipojn, kiuj fundamentas la maldemokratiajn sintemojn. Postuli, ke ĉiuj en nia patrio estu en komfortaj situacioj antaŭ ol konsenti, ke alvenos alia grupo de fremduloj faciligus la ekziston de riĉuloj bonege servitaj flanke de amasoj de marĝenuloj ekskluditaj de la civitana bankedo.

### *Investoj kaj sociekonomia evoluo.-*

La Hispana Konfederacio de Entreprenistaj Organizaĵoj (hispane mallongigite kiel CEOE) konfuzas la sociekonomian evoluon de la sudaj popoloj kun la pliigo de la hispanaj investoj kun profito por malmultoj. **Ne ĉiu investo kontribuas al la sociekonomia evoluo.** Ekzistas investoj malutilegaj por la ekosistemoj, dum aliaj pliigis la eksterajn ŝuldojn de la trafitaj landoj kaj provokis en ili pliiĝon de la nombro de sendungitoj. La interesoj de la marketo ne nepre koincidas kun tiuj de la laboristoj sudalandaj. La marketekonomio provokas ekskludon kaj bezonas sub-

pagatajn laboristojn, nekonantajn siajn laborrajtojn, por ekspluati ilin facile. Ekzistas ankaŭ opininfluo favora al subkonktrola malfermo de naij landlimoj por akcepti nur tiom da laboristoj, kiuj konvenas al niaj entreprenistoj kaj nei al ili ties rajtojn kaj ian ajn politikan influon.

Kiel oni povas kontroli la migrofluojn? Unue, oni devas agnoski, ke parton de la solvo konsistigas la alpreno de globalaj ekonomiaj rimedoj, kiuj ne potencigu la ekskludon kaj la marĝenecon. Tendenco ekzistas bremsi la enmigradon pere de politikoj de internacia helpo (investi en la landoj de elmigrantoj, malgraŭ la konstato de la malrapideco kaj malmulta efiko de tiaj politikoj).



**La klopodo reguli la migrofluojn estas nur fusaĵo, kiu ne kunportas radikan solvon. La plej efika solvo konsistos el ekvilibrigo de la rilatoj Nordo-Suden. Al la politikoj de kunagado oni aldonu aliajn komplementajn, kiujn mi pridetalos poste.**

Kiel provo de la opinio majoritata de la entreprenistaro, atentu al la dirito de la prezidanto de CEOE, José María Cuevas, dum azembleo: 'Apenaŭ kulpas la evoluintaj landoj pri la misfortunoj de Afrikko, kulpas ja la kronikaj malbonoj de tiu kontinento: la tribismo, la subevoluo, la senĉesaj militoj meze de epidemioj kaj malsato; al kiuj oni povas aldoni la malutilajn movadojn por naciaj liberigoj…'

**Konklude, oni povas diri, ke la migrofluoj havas strukturajn kialojn priprofitataj de ekonomia sistemo avida de rentabilitato je la kosto de la ekspluatado de subpagataj laboristoj. Ĉiu ajn politiko progresema pri enmigrado nepre devos debati la nunan malegalan sistemon de distribuado de riĉaĵoj, ja la vera devenigilo de mizero, malsato kaj militoj; kiuj siavice spronas elmigri al milionoj da personoj.**

***Partopreno de la civitanaro.-***

Ĉiu ajn politiko de la Administracio devos esti kunordigata kun la sociaj movadoj. Ne eblas strukturi la integrigajn politikojn sen aktiva partopreno de la sociaj agentoj. Devas ekzisti kompromiton por kontraŭbatali la maljustaĵojn, esti pli solidarecaj kaj malpli kulture arogantaj. Ni ne strebu al pliaj profitoj sen antaŭa ĉirkaŭrigardo de la homaj mankoj. **Pli justa mondo eblas. Ni batalu kontraŭ la ekskludo kaŭzita planede de la ekonomia terglobiĝo senbarita el kiu nur atingas decajn profitojn malmultoj, je la malutilo de multoj.** Oni esprimis en la Internacia Traktato pri Rajtoj Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj rubrikitaj de plejmulto de la Unuiĝintaj Nacioj, ke 'la ŝtatoj devas formuli politikojn de nacia evoluigo adkvataj je la celo de konstanta plibonigo de la bonfarto de ĉiuj loĝantoj, surbaze de ties partopreno aktiva, libera kaj signifa en la evoluo ekonomia kaj en la justa distribuo de la profitoj de ĝi'. Tamen, dum la monda produktado okobliĝis ekde 1960, unu homo po ĉiu 2 vivas nuntempe per du dolaroj ĉiun tagon; unu homo po ĉiu tri ne disponas de elektra energio; unu po ĉiu kvar vivas per malpli ol unu dolaro tage; unu po ĉiu kvin ne disponas de trinkebla akvo; unu po ĉiu ses estas analfabetulo kaj unu plenkreskulo

Iru al paĝo 14-a


LIBERTAD
IGUALDAD
FRATERNIDAD



Venas el paĝo 11-a

po ĉiu sep, plus unu infano po ĉiu tri suferas subnutradon.

La Plano de Unuiĝintaj Nacioj por la Evoluo (PUNE) kaj UNICEF pritaksis ke ĉiujara elspezo de okdek milionoj da dolaroj dum unu jardeko garantius al cixuj homoj la disponeblecojn je baza edukado, bazaj flegmedicinaj servoj, adekvata nutrado, trinkebla akvo, krom je la necesaj servoj ginekologiaj kaj akuŝaj por la virinoj.

***Antaŭ la enmigrado, la kunagadon al la sociekonomia evoluo.-***

Per diversaj iloj estus eble montrite de pluraj spertoj, malpliigi draste la bezonon elmigri pere de forigo de la mizero, kiu estas ties ĉefa sprono. Mi esprimos ilin jene:

1e.- Nuligo de la ekstera ŝuldo.
2e.- Tobin-imposto.
3e.- La 0.7% de BNP (bruta nacia produkto) kiel publikan helpon al la sociekonomia evoluo.
4e.- Imposto je la grandaj fortunoj.
5e.- Plano de struktura aljustiĝo.
6e.- Komerco justa.
7e.- Kunevoluigo.

***1e.- Nuligo de la ekstera ŝuldo***

La sumo repagata dela subevoluintaj landoj estas proksimume unu kvarono el la defenda buĝeto de Usono, naŭ procento de la tutmondaj defendoelspezoj, ok procento de la publicitaj ĉiujaraj elspezoj tutmondaj, aŭ la duonon de la fortuno de la kvar plej riĉaj homoj el la mondo.

La repago de la ekstera ŝuldo estas tre peza balasto por la evoluo de la ekonomio kaj de la sociaj kaj sanfakaj servoj de la malriĉaj landoj, kiuj iam enŝuldiĝis por kreskigi ties produktadon, sed poste ne kapablis elpagi laŭ la kondiĉoj rubrikitaj kun la financaj institucioj, pro la subita disfalo de la prezoj de ties varoj en la internacia marketo. La repago de la publika ŝuldo de la sudaj landoj ekvivalentas averaĝe al 200 000 aŭ 250 000 milionoj da dolaroj pojare, tio estas, duoblon aŭ trioblon de la neceso por satigi la bazajn homajn bezonojn difinitaj de UN.

En multaj kazoj la ekstera ŝuldo estas nerepagebla kaj por pagi la interesojn de la unua ŝuldo, la koncerna lando devis pruntepreni plian monon. Finfine, FVI (Fonduso Valuta Internacia) komencis pripensi la popartan aŭ plenan nuligon de la ŝuldo de kelkaj landoj konstatinte, ke ties postuloj de ekonomiaj aljustiĝoj kaj socian elspezan aŭsterecon al la landoj enŝuldiĝintaj cele al repago de la pruntedonoj agis kiel eksplodilon de seriozaj sociaj ribeloj en tiuj landoj. **Nepras pli rezolutan politikon de ŝuldonuligo**, kiel ree petis mondoskale diversajn progresemajn sociagentoj, neregistaraj organizaĵoj kaj areligiaj komunumoj (el kiuj elstaras la katolika, pere de ties supera aŭtoritatulo, la Papo Johano Paŭlo 2-a).

***2e.- La Tobin-imposto***

Alia rimedo por malpliigi la malekvilibron nordo-sudan estas la ekfunkciigo de imposto sur la financaj interŝanĝoj –ideo de la nobelpremiito pri ekonomio James Tobin, poste adaptita de aliaj ekonomiistoj kaj alpropriĝita de ATTAC (mallongigo hsipana de Asocio por Tributo sur la Financaj Transakcioj kaj Helpon al la Civitanoj)—. La celo de la imposto estas liberigi gravajn fondusojn investeblaj je la sociekonomia evoluo. Ĉi liberigitaj fondusoj devus, laŭ la UN, esti disvididataj po du

egalaj partoj: la unua por fonduso socia kaj ekologia, kreota en la landoj de deveno de la transakcio; kaj alia por fonduso redistribua, investota en la eduksistemoj kaj sansistemoj de la sudaj landoj. ATTAC opinias adekvata jaran imposton 0.1 procentan.

### *3e.- La 0.7 % de BNP kiel publika helpo al la sociekonomia evoluo.*

La tuta sumo de la publika helpo porevolua tre malproksimas de la 0.7 proponita de UN kaj ne sufiĉas por nuligi la negativajn efikojn de la repagoj de la eksteraj ŝuldoj de la sudaj landoj kaj, krome, ĝi malkreskadas.

Oni devas kalkuli kun la fakto ke granda parto de la publika helpo konsistas el pruntedonoj repagendaj. Male, por sukcesi je ties celoj, la publika helpo nepre sumu 0.7% de BNP el ĉiu pruntedoninta lando kaj konsistu tute el donoj nerepagendaj.

### *4e.- Imposto je la grandaj fortunoj.-*

Jen unu el la proponoj de la movadoj kontraŭtutmondiĝaj. Ĝi temas pri ekscepta imposto sur la havo de la fortunegoj. La pagontoj de tiu ĉi imposto solidarece devus pagi proksimume dek procento sur siaj havoj. La destino de la atingita sumo estus, nature, la helpon al la subevoluintaj ekonomioj.

### *5e.- Plano de ekonomio aljustiĝo.-*

Ĉiuj esprimitaj antaŭe projektoagoj ne efikus sufiĉe kontraŭ la senĉesa pliiĝo de la mizero, se oni ne kontraŭstarus rekte la negativajn politikojn de altruda aŭstereco kiujn plue defendas FVI kaj aliaj financaj institucioj, ĉar tiuj ĉi estas malfacile harmoniigaj kun la ekzerco de la rajtoj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj de la malfavoritaj landoj.

Necesas anstataŭi la nunan mondan strukturon, kies logikon altrudas la nordaj landoj al la periferiaĵo (sudaj landoj). En la nuna strukturo la riĉaj landoj de la nordo agas kiel ekonomian centron, kiu neleĝe posedas la kapitalon kaj la teknologiajn avangardajn, dum la sudaj landoj rolas kiel periferiaĵon kaj devas provizi ilin per netransformitaj varoj kaj enmigrintoj subpagataj.

Estas konvene potencigi ŝanĝon permesontan pli intensajn rilatojn ekonomiajn inter sudaj landoj mem. Tio ĉi konsistus el starigo de zonoj de landoj sudaj kun plej favorataj interrilatoj –simile al MERCOSUR (mallongigo hispane de KomunaMarketo Sudamerika) kiuj povus alpreni regionajn instituciojn kun povo por reguli la ekonomiajn kaj sociajn komunajn aferojn. La landoj de tiuj ĉi zonoj devus plifortigi siajn itnernajn marketojn; potencigi la ŝparadon lokan, cele al ties memfinancoj; plikreskigi la serv-areon de siaj sanaj kaj edukaj sistemoj; ili povus diversigi siajn eksportojn por rezisti la kapricajn ŝanĝojn de la internacia marketo. Aldone ĉion ĉi estus tre konvene por la asociitaj landoj fari agrokulturajn reformojn por garantii la ĝeneraligitan alprenon de bienoj al la kamparanoj, kaj same ili faru reformojn por garantii loĝejon decan al ĉiuj.

### *6e.- Komerco justa*

Laŭ la ekonomiistoj Eric kaj Armand aperas la jenajn intervenajn bezonojn kadre de la malegala nordasuda komerco:

·Stabiligi la prezon de la netransformitaj varoj garantiante la pagojn de la importoj per la faro de reguligaj stokoj.

·Kuraĝigi la formadon de karteloj de produktistaj landoj kio permesus tiujn la reinveston de ties gajnoj je la ekonomia evoluo.

·Agnoski la rajton de ĉiu lando al nutra suvereneco, ĉefe al la memsufiĉo rilate la fundamentajn produktaĵojn. Unue oni devus garantii la provizadon de la lokaj marketoj de la malriĉaj landoj kaj eksporti nur la plusojn agrokulturajn.

·Ekskludi de la Ĝenerala Akordo pri Komerco kaj Servoj la publikajn servojn tiaj, kiaj: sano, kulturo, eduko, kaj akvoprovizo. Tiuj ĉi estas la plej bona garantio de la individuaj rajtoj kaj la vivokvalito.

·Forigi la fiskajn paradizojn: ili faciligas la impostan fraŭdon, la koruptiĝon kaj la lavadon de forjuraj gajnoj.

## 7e.- Kunevoluigo.

Tio ĉi temas pri projektoj de evoluihelpo al la sudaj landoj kalkulante kun la kunlaboro de la enmigrintoj mem aŭ de la neregistaraj organizaĵoj, kiuj agas en la landoj de intensa elmigrado norden, ekzemple:

·Faciligo de la investoj produktivaj de la mono ŝparita de la enmigrintoj en siaj devenaj landoj, donante prioritaton al tiuj investoj kiuj kreos pli da laborpostenoj.

·Financa apogo al la neregistaraj organizaĵoj, kiuj intervenas en la regionoj de intensa elmigrado per ofta uzado de la mikrofinancoj, t.e.:

a) Mikrokreditoj.- Sumetoj de mono pruntedonataj al individuoj aŭ kolektivoj de malgrandaj akirkapabloj.

b) Mikroŝparoj.- Deponaj servoj de etaj ŝparsumoj por alfronti emergencojn.

c) Mikroasekuroj.- Sistemo pere de kiuj individuoj, entreprenoj kaj alitipaj kolektivoj faras financajn pagojn por kunhavi riskojn, t.e.: vivasekuroj, bienasekuroj, medicinasekuroj kaj handikapaj asekuroj.

## Konkludoj.-

Hispanio maljuniĝas demografie pli rapide ol aliaj eŭropaj landoj. Pro la industria evoluo kaj la sinsekvaj socifamiliaj ŝanĝoj nia lando iris de fabriko de elmigrantoj al celo de enmigrintoj kun granda dependeco de tiuj ĉi en kelkaj sektoroj. Entute, la sendunga indico ne multe ŝanĝis pro la enmigrado, ĉar la postenoj okupataj de la eksterlandanoj estas ĝuste tiuj, kiuj emas forlasi la hispanojn. Tamen, la enmigra fluado ne dependas de la nacia neceso, sed de la bezono de tiuj homoj elmigri ĉi tien por subteni sin kaj ties familiojn kaj ne utilas barumi nin kontraŭ la nepetitaj fluoj. Por eviti ke la enmigrado kaosigu nian socion aŭ kreu mizerajn getojn akompanataj de rasismo kaj perforto; unue oni akceptu la fakton, ke peljmulto el la elmigrintoj neniam reiros hejmen. Ĉiu ajn hispana estraro devos, krome, fari veran integrigan politikon rilate klerigadon, loĝejojn kaj dungigon—garantiante egalecon de sociekonomiaj rajtoj al la enmigrintoj—. Ankaŭ devos mildiĝi la postuloj por nacianiĝi al tiuj kiuj deziras pluresti ĉitie, kaj ankaŭ doni ĉiujn la rajton baloti en la municipaj balotadoj por eviti ĉian ajn diskriminacion inter la civitanoj el la landoj de la EU kaj la ceteraj eksterlandanoj.

*Jozefo Pina Tuells*

# La 13-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo

... okazos dela 1-a ĝis la 8-a de oktobro de 2005 sub la aŭspicioj de la HIspana Esperanto-Muzeo.

La **koresponda adreso** estas:

Luis Serrano Pérez,
Apartat 423,
ES-08200. Faksilo (34) 93 731 101 1, rete *luis-serrano@mixmail.com*, kaj http://www.terra.es/personal5/lserrano2003/ .

Aliĝkotizoj: 20 eŭroj, ĝis la 31-a de julio. Ĉiu aliĝinto ricevos la verkon ***Don Kiĥoto***. Kompleta pensiono, 30/40 eŭrojn du/unulitan ĉambron tage.

**Programo**:

1 *Cent jaroj da* ***Esperanto***, de Stano Marĉek
2 *Alitipa legado de Don Kiĥoto*, de Ludoviko Serrano.
3 *De la akvo al la tero-evoluo de la vegetaĵoj*, de Pere Navarro-Rosines.




***Dua Premio Ada Sikorska Fighiera***

*Gian Carlo Fighiera, Ludoviko Serrano, Jakvo Torné,Emiljo Sanz kaj Salvador Aragaj estas la komisiono de premio, kiun oni donas al esperantisto, kiu akiris gravajn meritojn en la laboro por Esperanto, honore al la antaŭa redaktorino de* ***Heroldo de Esperanto*** *dum multe da jaroj, kaj granda laboristino pri Esperanto.*




La Internacia Esperanto-Semajno iĝas pli kaj pli grava inter la esperantaj renkontiĝoj pro tio, ke ĝi estas interesa evento en tre agrabla etoso, kaj dum malalta turisma periodo. Mi rekomendas partoprenadon kaj ĝuadon de la kataluna marbordo.

# La 14-an de aprilo

La pasintan 14-an de aprilo estis la 74-a datreveno de la tago, kiam oni proklamis la Duan Respublikon en Hispanio.

Tiam oni provis ŝanĝi ĉion, eĉ la flagon kaj la himnon de la nacio, tiel, ke kiam oni ankoraŭ parolas pri la trikolora flago, oni parolas pri la «flago de la respubliko». Sed oni tuj devus demandi, «ĉu temas pri la unua aŭ la dua respubliko?» Ĉar en Hispanio, ĝis nun, ekzistis du diversaj respublikoj. La flago de la nacio dum la unua estis la sama flago, kiun ni havas nun, kiu estas ruĝa kaj flava.

Dum multe da jaroj mi kredis, ke Francisco Franko subite ribelis kontraŭ tiu demokrata Arkadio, kie ĉiuj estis feliĉaj, kaj finis ĝin, ĉar fiaj homoj ne toleras, ke ekzistu feliĉo sur la tero. Sed poste mi legis, ke ekzistis aliaj homoj kiuj, antaŭ li faris tion, atencis kontraŭ la respubliko, kaj ili perforte celis devigi en la landon «popolan respublikon», alidirite «diktatorecon de la popolo». Ĝi sukcesis nur en Asturio, en 1934, male al la ceteraj partoj de la lando, kie popolo ne sekvis la socialistajn kaj komunistajn gvidantojn, kiuj vokis al ribelo de «reĝimo de kapitalistoj», kaj la laŭleĝa Prezidanto de la Respubliko petis Generalon Frankon, ke li subpremu la ribelon. Oni nun rilatigas tiujn maldolĉajn eventojn asturaj kaj tion, kio okazis en la tuta Hispanio post la venko de la Popola Fronto (maldekstraj kaj ekstremmaldekstraj partioj), kaj oni facile konkludas, ke la Intercivitana Milito komencis en Hispanio ne je 1936, sed je 1934, kaj ne fare de dekstruloj, sed de maldekstruloj. Pri tio nun estas sufiĉe da diskuto, kaj estas akuzoj pri «reviziismo», kiu en buŝo de ekstremomaldekstruloj havas malican nuancon, sed oni ne reviziias tion, kio okazis, sed tion, kion oni diras, ke okazis. Dum multe da jaroj kelkaj verkistoj, pli fidelaj al siaj ideologio ol al vero, diris mensogojn kaj troigis, sed nun oni finfine havas aliron al ĝis nun sekretaj arĥivoj, kaj oni povas scii pri tio, kio okazis, multe pli bone. Ni havas, ekzemple, la nomojn de miloj da homoj, kiujn oni mortigis en *ĉekoj*[1] disde la tuta lando. Nun, dum la anoj de la socialismaj partioj volas malentombigi siajn murditojn, oni ankaŭ ekscias kial ili estis murditaj, kaj ankaŭ kial tiuj de ili murditaj ankaŭ estis murditaj. Dum la sepdekaj jaroj oni tre lerte kaj inteligente interkonsentis pasigi la paĝon, kaj ne plu paroli pri tiu malĝoja parto de nia historio, sed se oni insistas fiparoli pri unu flanko, la alia flanko ne povas montri tre klaran aspekton...



Reĝo Johano Karlo I-a



Generalo Franko

[1] *Ĉeko* estis torturejoj, kies nomo devenas el rusa akronimo.

La Prezidento de Hispanio hieraŭ diris, ke *la Reĝo de Hispanio estas sufiĉe respublika*. Tio estas vera idiotaĵo, sed ni jam alkutimiĝis al tiuj diraĵoj senkleraj. Pli danĝera idiotaĵo estas, ke nia Ministro pri Eksteraj Rilatoj vizitu Usonon, kaj oni ne volas ricevi lin tie, kaj eĉ se altranga oficistino finfine vidas lin, ŝi rifuzas veni antaŭ ĵurnalistoj kune kun li. Hispanio montris laŭ historio, ke ĝi ne estas respublika, kaj ĝi eble neniam estos. Tio vere malĝojigas min, ĉar mi, kiu vere pledas por libereco kaj respekto al individuaj rajtoj, estas esence respublika.



La prezidanto de Hispanio.

Sed la unua respubliko daŭris nur dek unu monatojn (inter la regadoj de Amadeo 1-a kaj tiu de Alfonso 11-a), kaj kvar Prezidentojn.

La unua el ili, S-ro **Estanislao Figeras**, ekfuĝis al Parizo pro tio, ke li «estas ĝis la ovoj de ĉiuj ni»; la dua, S-ro **Pi i Margaĝ'**, volis enkonduki federaciismon, kiu preskaŭ disigis la landon en kantonojn; la tria, **Nikolao Salmeron'**, devis uzi perforton por revenigi aferojn en normalecon, sed li rezignis sian postenon ĉar li ne volis subskribi mortopunon; kaj la kvara, S-ro **Emiljo Kastelar'** diris, ke por subteni ĉi tiun regomanieron, li *bezonas multe da kavalerio, multe da artilerio, multe da Civilgvardio* (milita polico), *kaj multe da policanoj*. Tio okazis de la 11-a de februaro de 1873 ĝis la 2-a de januaro de 1874.



Estanislao Figeras

Post la Unua Respubliko, venis en povon Alfonso 12-a, kaj kiam li mortis, venis en povon sia filo Alfonso la 13-a. Je la 12-a de aprilo de 1931 okazis en Hispanio municipaj balotadoj en la tuta landoj, kaj pri tio, ke en la ĉefaj urboj, la respublikaj partioj venkis, la ministraro timis malkontenton kaj ĝeneralan perturbon. Eĉ se je la tuto, la monarĥiaj partioj venkis en la lando (kvaroble pli nombre ol tiuj respublikaj), ili timis tiom multe, ke ili rezignis, la monaĥo forlasis sian postenon, kaj oni proklamis la 2-an Respublikon. Sed **la hispana popolo neniam elektis inter Reĝolando kaj Respubliko**, sed inter la diversaj kandidatoj por la posteno de urbestro aŭ vilaĝestro. Certe endis, ke oni organizu tiam referendumon pri ĉu oni havu Reĝon ĉu Respublikon, sed tio neniam okazis: la **monarĥiistoj** simple **fuĝis**, kaj la bravulaĉado surstrata venkis.

Tiu komenco ne povos finsukcesi. Oni vendis al ni la ideon, dum multe da jaroj, ke *la Respubliko venis sen sangoverŝado, kaj necesis multe da sangoverŝado por forpreni ĝin*. Sed oni forgesas, dum tiu ekspliko, ke la unua sangoverŝado okazis en Asturio je 1934, kontraŭ la Respubliko, sed fare de la maldekstraj partioj, ĉefe de PSOE kaj PCE, tio estas,

la nuna reganta partio en Hispanio, kaj la Komunisma Partio de Hispanio. La Dua Respubliko Hispana daŭris pli ol la unua, kvin jaroj. Post ĝi, la Diktatoreco de Francisco Franko daŭris 36 jarojn, ĝis la Diktatoro mortis. Poste, dum tri jaroj oni arde laboris, kaj je 1978 oni produktis la plej longdaŭran Konstitucion de Hispanio, kiu daŭras ankoraŭ, 27 jarojn poste. Ĝi ankaŭ estas la plej progresema konstitucio, kiun ni havis ĝis nun, ĉar ĝi ne toleras, ke okazu leĝo kiel tiu «Leĝo pri Defendo de la Respubliko», kiu dum granda parto de la vivo de la Dua respubliko forprenis bazajn liberecojn de civitanoj.

Ĉu iam ekzistos Tria Respubliko Hispana? Mi ne scias, kvankam mi multe dubas pri tio. Respubliko devas esti, unue, sistemo, kiu garantiu la liberecon kaj rajtojn de ĉiuj civitanoj. Ĝi devas garantii socialan pacon por ke industrio kaj entreprenoj povu labori kaj dungi laboristojn je justaj kondiĉoj.

Plaĉus al mi, ke aliaj homoj, kiuj sentos sin sufiĉe respublikemaj por dediĉi al ĉi tiu temo iom da tempo, reagu al mia artikolo, kaj diskutu pri tiu temo, **Respubliko en Hispanio**, kaj argumentu kontraŭ miaj ideoj, se ili ne konsentas kun miaj konkludoj. Respublikon oni de ĉiam diigis en Hispanio, sed mi opinias, ke ne hazarde oni reprezentas ĝin per putino kun flago kaj ĉapelo ruĝa kiel sango.

Lasante vin per tiuj respublikaj pensoj, mi salutas vin ĉiujn elkore,

*Jesuo, Mursjo,*
*je la 15 de aprilo de 2005.*



Prozopopeo de Respubliko Hispana Dua.

# Post referendumo

*de Edgar*

Ankoraŭ dekdu horoj ne pasis de la fino de la referendumo por esti pli *eŭropa*. Oni disvendis ĉi tie, Hispanio, la ideon, ke esti eŭropa estas *bona*, ke esti eŭropa estas *progresiva*, ke esti eŭropa estas *moderna*... Tamen, ankoraŭ mi ne aŭdis pri tio, kio okazus al ni, kiu nedezirebla katastrofo kondamnus nian vivon por ĉiam, se ni voĉdonas nee, se ni ne deziras *esti eŭropa,* se ni diras, ke ne, al Sinjoro Zapatero.

Demokratio, mi legis en bazlernejo, estas la regado de ĉiuj la civitanoj. En demokratio, oni diskutas klare kaj libere pri la diversaj koncernaj alternativoj. Ĉe ni tio ne okazis: nur jese oni povas voĉdoni, ĉar oni eĉ ne pensis, ke oni povas ne esti eŭropano. Tamen..., kio estas *eŭropa* nun por ni?

En lernejo mi lernis, ke francoj invadis nin iam. Ili venis celante invadi Portugalion, sed ili restis en Hispanio, ĝis kiam oni forpelis ilin per sendependisma milito. Mi ankaŭ lernis, ke je la fino de la Dua Mondomilito, tiu, kiun Francio kaj Germanio malvenkis –sinsekve, kompreneble—, kaj tiu, kiun Usono venkis, multaj landoj, inter ili Francio, Britio kaj Usono, postulis, ke estu blokado ekonomia kontraŭ nia lando pro tio, ke ĉe ni regis diktatoro, Franciso Franco. Diktatoreco estas malbona, laŭ ili. Ili ja devintus veni en Hispanion kaj forpeli la fian diktatoron el sia posteno –kial diable ili ne faris tion?, mi nun demandas kun bedaŭro—. Do, ne farinte tion, ili dekretis, ke la plej bona afero por la hispana popolo estas, ke ni ne havu viandon, fiŝon, panon, kaj aliaj frandaĵojn, kiujn ni emis manĝi kaj uzi. Sole, ni estu justaj, Argentinio defiis la blokadon kaj libere komercis kun ni.

Jaroj pasis, kaj iom post iom, ni amikiĝis kun usonanoj kaj francoj, kaj ne tiel multe aŭ ofte kun britoj. Iom post iom, eĉ sub la boto de la fia generalo, ni disvolviĝis, kaj konstruis bonan industrion kaj riĉecon. Samtempe, *Eŭropa Arkadio* konstruiĝis, la Komuna Merkato de Eŭropo. Hispanio petis aliĝi tien, sed oni respondis, ke ne povis aparteni al tiu riĉa klubo lando, kies reganto estas diktatoro. Ne gravis, tamen, ke en Grekio aro da koloneloj regis la landon: ne temis pri generalo... Ne gravis, ke diktatoro estas figuro kreita de romia leĝaro por alfronti eksterordinaran situacion, provizore. Gravis, ke en Hispanio la provizoreco de diktatoreco ŝajnis definitiva. Evidente, tia riĉa klubo faris nenion helpi la finon de la diktatoreco. Ili helpis fini ĝin en Italio kaj Germanio, sed ne en Hispanio. Verŝajne la homoj ĉi tie estas subuloj, de alia kategorio.

Dume, ili havis diplomatiajn rilatojn kun plej granda diktatoro, Jozefo Ŝtalino, sed tio ne gravis. Povo igas aŭtoritaton, kaj nia diktatoro estis malgranda, li murdis centonon de la kvanto, kiun la Ruĝa Diktatoro murdis, kaj eĉ se oni faris *malvarman militon* kontraŭ li kaj sia potenco, Sovetunio, kontraŭ ni estis milito ekonomia. Teroristoj komencis esti ĉe ni, kaj ili trovis sanktulejon en Francio, ĉar laŭ la francoj, teroristoj laboris por paco, kontraŭ diktatoreco kaj faŝismo. Oni helpis levi Eŭropon denove de sur siaj cindroj per sindona helpo mona de usona Plano Marŝalo, sed Hispanio, ne batalinte je la Dua Mondomilito, ricevis nenion, nur blokadon...

Kaj fine, kiam helpo venis, tute kontraŭ la opinio de Francio kaj la cetera Eŭropo, temis pri usona generalo, Eishenhower, kiu metis strategion kaj la intereson de sia nacio antaŭ ĉia alia politika konsidero. Eble gravis multe tio, ke li estis militisto, kaj ne politikisto, por tio, ke Prezidento de Usono vizitis Hispanion. Li pristudis la mapon de nia lando, kaj trovis, ke ĝi ŝajnis granda aviadilŝipo je la Mediteraneo, la unua tranĉeo en ebla milito kontraŭ Sovetunio. Li venis kaj rendevuis kun

*Tío Pako* –moknomo por Generalo Franko— en Madrido, kaj ili interkonsentis pri starigo de kelkaj bazoj por aviadiloj en lokoj de Andaluzio –proksime de Maroko— Madrido –je la geometria centro de la lando— kaj proksime de Saragoso –relative proksime de Francio—. Tio kostis al Usono monon, kompreneble. Per tiu mono, kaj la entreprenismo kaj industriismo de multaj hispanoj, tute ne malhelpataj de la fireĝimo de *Tio Pako*, progreso faris grandan paŝon en nia lando, kaj subite eblis havi luksaĵojn, pri kiuj oni vidis antaŭe nur en usonaj filmoj: oni povis aĉeti domon, aŭton, duan domon, vojaĝi, turismumi..., kaj migrado al Germanio jam povis fini. El tiu tempo venas ĉarmaj kantoj, kiel *Mañana voy p'a Alemania* (morgaŭ mi iras al Germanio), kortuŝige kantita de Antonjo Molina, kiuj priskribis landon, kiu ne plu okazis.

Finfine, mortis la Fia Generalo, en sia lito, kaj la heredantoj de la reĝimo ne sciis kion fari: ili vidis nur problemojn, kaj opciis per la plej inteligenta ebleco, kiun ili havas: la reĝimo memmortigis. Hodiaŭ, kiam mi aŭdas aŭ legas pri tio, kiom oni ŝuldas al demokratiuloj *de ĉiam*, al tiuj, kiuj kontraŭbatalis *la reĝimon* en *la klandestinecon*, mi ne povas ne ridi: ili faris nenion krom paroli kaj paroli, kunveni, kuri antaŭ la policon, kaj sopiri al pli justa lando. Oni ne povas vere kondamni ilin, kaj fakte mi estis unu el ili. Mi ne estis en karcero, mi ne gluis afiŝojn sur muron, sed mi ja kuris antaŭ la polico pli ol unufoje. Ankaŭ mi sopiris al pli libera lando, al demokratio, al libereco, al liberesprimo kaj aliaj konkeroj de homaro, pri kiuj mi aŭdis en eksterhispanaj radiostacioj kaj legis en fremdaj ĵurnaloj. Tamen, demokratiuloj ne reportis la demokration en Hispanion post la morto de la Generalo. Mi ankoraŭ memoras la figuron de Prezidento Arias Navarro, la lasta Prezidento de Franko, informante nin per la Hispana Televido pri la baldaŭa apero de la Kongreso kaj la Senato. Oni intencis kopii la usonan sistemon, sed bedaŭrinde ili kopiis ĝin tre malbone: en Usono ne estas reĝo, kaj ties povojn havas la Prezidento, kiun oni elektas ĉiun kvaran jaron. En Hispanio oni voĉdonas de tiam ĉiun kvaran jaron, sed la reĝo estas ĉiam la reĝo. Mi ne vere objĵetas al tio, ĉar la reĝa familio estas konekso de la popolo kun la pasinto, sed ne ĉiu hispano opinias same kiel mi. Vere, devas esti referendumo pri tio iam. Okazas, tamen, ke en Hispanio jam estis du respublikoj, kaj ambaŭ du havis tre fuŝajn kaj bedaŭrindajn finojn. Do, ni vidu, ĉu la brita sistemo utilas pli.




Je 1978, tri jarojn post la morto de *Tío Pako*, oni verkis la duan liberan konstitucion de Hispanio de nia tuta historio, estante la unua tiu de Kadizo (Cádiz, hispane), verkita dum la francoj invadis la ceteran parton de Hispanio, je la komenco de la 19-a jarcento, 1812. Oni povus diskuti, ke la Konstitucio de la Dua Hispana Respubliko estis ankaŭ libera, sed jam de la komenco de tiu dokumento oni povas rimarki sektisman nuancon: *Hispanio estas Respubliko de laboristoj de ĉiaj klasoj*... Kio pri tiuj, kiuj ne estis laboristoj ĉar ili ne volis aŭ ne povis? Ĉu ili ne rajtas esti respublikaj? Ĉu ili devis foriri la landon simple pro tio, ke ili ne estis laboristoj? Laboristoj estas ni ĉiuj, plejparte pro tio, ke ni ne sukcesas vivi sen labori, sed la kvaliton de nia vivo ne donas la momentoj, kiujn ni pasigas en niaj laborpostenoj, sed ekzakte tiuj, kiujn ni havas por ni mem, tiuj de libertempo, ne necese da nenionfarado, eĉ se inkluzivante ilin. Ĉar vivi ne estas labori, eĉ se ni ĉiuj devas labori por vivi. Nu, tiuj bonaj homoj, kiuj verkis la –laŭ ili— plej progresistan konstitucion en la mondon,

pretervidis bazan aksiomon en juro, ke malplimulto ankaŭ havas rajtojn, kaj neglekti tion signifas endanĝerigi la socialan sistemon, ĉar iam venos la tagon kiam ni mem jam estos oldaj kaj konstruintaj diversajn rajtojn, kiujn oni ne legitime povas forpreni el ni juste. Sed sufiĉas pri la Respubliko, kiu finiĝis per enaj kaj malenaj atakoj de ĉiuj, respubliko je kiu kredis nur kelkaj dekstruloj de tiu tempo...

La Konstitucio de 1978 estas la plej longdaŭra de nia tuta historio, kaj nur preskaŭ tridek jaroj post sia apero estas cirkonstancaro, kiu ebligas, ke oni ŝanĝu ĝin. Bedaŭrinde, ne por plibonigi ĝin, sed serĉante apartigi parton de la lando, kiu ĉiam estis kune. Mi memoras, ke estis referendumo por aprobi ĝin, je tiu sama jaro. Ankaŭ estis referendumo je 1986 por decidi ĉu ni restos ĉe NATO, ĉu ni foriras de tiu milita pakto. Mi memoras, ke dum tiuj tagoj, oni povis vidi en televido kaj en ĵurnaloj oni povis legi diversajn opiniojn ĉu porajn ĉu kontraŭajn al la de la registaro proponita temo. Ekzemple, respublikanoj diris sian penson je 1978 pri nia konstitucio, klarigante siajn vidpunktojn. Dum la referendumo pri la NATO, mi memoras, ke oni ankaŭ havis liberan forumon en diversaj medioj por diri sian penson. Poste, ni libere kaj demokratie iris voĉdoni pri tio, kion ni deziris por nia lando.

Sed okaze de la referendumo de hieraŭ ni ne havis tiun ŝancon. Dum la tuta kampanjo la du grandaj partioj de Hispanio, la Partio Socialisma Laborista Hispana (PSOE laŭ ĝia hispana siglaro) kaj la Popola Partio (PP) komplotis por kaŝi al la hispana civitano la eblecon kontraŭstari la diversajn vidpunktojn kaj opiniojn pri la temo. Oni naŭze kaj eĥe blekis jesajn sloganojn, kaj sekve multe da inteligentaj homoj havis ne alian ŝancon ol ne partopreni en tiu maskerado. Aliaj, trovante sin *pli sinceraj* aŭ *demokrataj*, opciis voĉdoni nee en tiu referendumo.

Mi rigardis kun miro hodiaŭ, ke preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj prezentis la aferon kiel *venkon* de jeso, kaj dualinee oni asertas, tamen, ke la nepartopreno atingis la 57'68 %! Tio ne estas venko. Tio estas venko de nepartopreno. Tio signifas, ke hispanoj prifajfas, ĉu ni havas eŭropan konstitucion, ĉu ni ne havas ĝin. La Prezidento, tamen, diras nun, ke tio estas lia persona venko, ke li entuziasmigis la popolon, por ke oni diru jes al konstitucio. Mi dubas, ke li mem kredas tion. La estro de la opozicio, S-ro Raĥoj –kiu plejbone demisiu tuj—, diras, ke *malgraŭ granda nepartopreno* la popolo elektis akcepti la eŭropan konstitucion. Mi dubas ankaŭ tion. Mi kredas, ke ili agis same kiel la du famaj klaŭnoj, la lerta kaj la mallerta, fronte al nelerta publiko, kiu aplaŭdas iliajn klaŭnaĵojn. Tamen, la aĵo iĝis aĉo, kaj neniu ridis, ĉar pli ol duono de la publiko iris plaĝen aŭ aliloken kaj tute ne partoprenis.



Nun ni devas eltiri kelkajn konkludojn: ĉu nia lando daŭre estas demokratio –aliajn opiniojn oni ne aŭdis—, ĉu oni ankoraŭ estas io, kion politikistoj havas diri al ni, ĉu estos kuraĝo en la popolo defenestrigi tiujn klaŭnojn, ĉu venontaj klaŭnoj estas same fipatosaj kiel ili du. Ĉu venos alia politikisto kiu sukcesos trovi la intereson de nia lando, kaj efektivigos ĝin.

Dume, kiel famaj klaŭnoj diris iam, mi nur diros, ke alian tagon ni parolos pri la registaro.

*Edgar, 2005*

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**


| | |
|---|---|
| REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO** Tfn° (00 34) 658 166 323 | **Retskribu al jesuo@ono.com** |
| http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k66.htm | |
| http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k66.htm | |






**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.**

ISSN 1697-6460